**La babiladaj rondoj** okazas vendrede je la 19a horo. La gastiganto mem preparas simplan manĝaĵon (**ĉef**manĝon kaj deserton). La invititoj alportas **nur** trinkaĵojn kaj aperitivaĵojn. Je la fino ĉiuj donacas monon al la gastiganto por kontribui al ties elspezoj. Okaze de kunveno ĉe Espace Dickens ĉiu kontribuas ankaŭ al la lupago de la salono. (Fr 80.-).

Aliĝu al unu aŭ la alia grupo perrete.

## "Ambaŭ grupoj" ĉe Espace Dickens

**vendrede, la 20-an de oktobro** organizata de Rosario Scopelliti kaj **vendrede, la 17-an de novembro,** organizata de Cléa Robin.

### "Okcidenta grupo" :

**Ve, la 3-an de novembro**
"ĉe" Pierre Delaunay
Av. d'Echallens 81, Lausanne
077 402 68 38

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/8dk45bkb8brdf2nd

### "Orienta grupo" :

**Ve, la 10-an de novembro**
ĉe Maryse Tissot
Rte de St-Légier 20 A, Vevey
079 408 71 76

Aliĝu ĉe:
http://doodle.com/poll/rwvef6hykb5dqds6


## Laŭzana Esperanto – Societo

ĉe F. Randin – ch. de Vallombreuse 14 * CH – 1004 LAUSANNE
+41 21 647 29 28 * sekretario@eo-l.ch
www.facebook.com/societedesperanto.lausanne
Poŝtĉekkonto – CCP 10-26785-8
Prez.: David Buhlmann * 021 624 36 38 – Vicprez.: Charlotte Blanc Maillard * 079 393 32 63 - Sekr.: François Randin * 076 411 14 55 - Kasisto : Françoise Pétermann * 079 517 44 43
Redaktoro de la informilo : Knud Sunier * 021 961 38 56


# Laŭzana Esperanto-Societo

# Informilo

novembro 2017 – n° 09

Lunde, la 6-an de novembro 2017
je la 20-a ĉe Espace Dickens
Charles Dickens 6 en Laŭzano

***Gramatikaĵoj kaj demandoj***



Sabate, la 16-an de decembro:

***Zamenhofa Festo*** *en Epalinges*

➢ **Vidu aliflanke por aliĝi**


Lunde, la 8-an de januaro : *(decidota)*
Lunde, la 5-an de februaro :

## Ĝenerala asembleo

## Citaĵo

*Donu al ĉiu tago la ŝancon iĝi la plej bela tago de via vivo.*

Mark Twain





**Sabate, la 16-an de decembro**
**je la 11-a.**

**ZAMENHOFA FESTO**

Kiel kutime, ni festos la naskiĝdatrevenon de L.-L. Zamenhof.



Ĝi okazos kiel lastjare ĉe
**Auberge communale**
**d'Epalinges**
Rte de la Croix-Blanche 27

- Prezo : **po CHF 25.-** persone

La Laŭzana Esperanto-Societo pagos la trinkaĵojn kaj la kafojn.

- **Bonvolu <u>nepre</u> aliĝi antaŭ la 8-a de decembro,** pagante la sumon al la konto ccp 10-26785-8 (Laŭzana Esperanto-Societo) kun mencio "Zamenhofa festo".

## KOMPRENU MIN, SINJORO POLICISTO

**Claude Piron, el Vere aŭ fantazie**

(Daŭrigo kaj fino)

Tion mi do faris. En ĉiu servo oni festis novjaron. "Venu, Patro, venu, sinjoro animzorganto", oni kriis al mi, tuj kiam oni vidis min alveni. "Venu festi kun ni. Vi ne malakceptos glaseton da ĉampano, ĉu ? Tio estus ofende al ni."

— Kaj vi, kvankam pastro, akceptis!

— Kompreneble mi akceptis. Ĉu vi ne povas bildigi al vi la situacion ? Diri "ne" estus agi tre malĝentile kaj ofende. Mi ne povas permesi al mi havi malbonajn rilatojn. Kiel pastro povus ofendi homojn je novjara festo ? Mi do jesis la unuan fojon.

— Kaj certe ankaŭ la duan, ĉu ne ? Kaj la trian.

— Kompreneble. Kaj tiam, mi jam komencis malpli bone estri min. Bedaŭrinde, mi nenion manĝis antaŭe, kaj vino kun ne-manĝo povas esti tre... tre efika.

— Tiel ke je la kvara servo...

— ...mi ne plu havis sufiĉe da volforto por diri "ne".

— Kiom da servoj estas en via malsanulejo?

— Ĝi estas tiom via, kiom mia: ĝi apartenas al la urbo. En nia malsanulejo estas dudek servoj.

— Vi do trinkis dudek glasojn da ĉampano?

— Jes. Tio estis mia unuafoja novjara nokto en malsanulejo. Mi ne sciis, ke ĉiuj servoj estas tiel unuanimaj en sia gusto pri ĉampano. Sed tiel estas. Ĉampanon mi ĉiufoje trinkis.

— Nekredeble!

— Kaj kiam mi alvenis al la elirejo, la du pordistoj min vokis. "Venu trinki, Patro", ili diris. Mi sentis min malforta ĉe la kruroj. "Ĉu vi povus doni al mi kafon, fortan kafon ?" mi demandis. Ili estas italoj kaj faras bonegan kafon. "Jes," ili respondis, tute ĝoje, "venu trinki bonan varman kafon, antaŭ ol iri en la malvarmon eksteren".

— Almenaŭ vi faris ion saĝan en tiu nokto.

— Jes. Ili preparis tason da kafo por mi. Kaj lastmomente, ĝuste kiam mi volis preni ĝin, la pli aĝa pordisto elmetis larĝan



rideton kaj diris: "Hodiaŭ estas novjaro, oni ne trinkas kafon nur tiel", kaj li faligis en mian kafon belan kvanton da frukt-alkoholaĵo.

